

# Esperanto aktuell

37. Jahr 2018 №3 (249)



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



- Mortis Hans-Dieter Platz (HDP)
- Vizito de la Esperanto-ĝardeno en Herzberg
- Opero en Esperanto en la praga Nacia Teatro
- UEA elektigis en gvidan neregistaran grupon ĉe UN
- Norbert Lammert und Esperanto
- Esperanto-tendumado en la Domeserparko en Herzberg
- Neforgesebla vojaĝo al Japanio

## Deutscher Esperanto-Bund e.V.

### Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B  
[www.esperanto.de/deb](http://www.esperanto.de/deb) (Netzpräsenz)

[gea.eo.tel](mailto:gea.eo.tel) (Kontakt Daten)

**Bankkonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) /

**Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEF1ERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

**Oficejo / Geschäftsstelle:**

**Esperanto-Laden**

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Sibylle Bauer**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

[sibylle.bauer@esperanto.de](mailto:sibylle.bauer@esperanto.de)

**Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung**

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

### Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / retmesaĝo al [gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form

[vorname.name@esperanto.de](mailto:vorname.name@esperanto.de).

Siehe auch [estraro.gea.eo.tel](http://estraro.gea.eo.tel)

**Prezidanto / Vorsitzender**

**Ulrich Brandenburg**, Durchwahl: -5111

[gea.prezidanto@esperanto.de](mailto:gea.prezidanto@esperanto.de)

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**

**Andreas Emmerich**, Durchwahl: -5112

**Trezoristo / Kassenwart**

**D-ro Matthias Hecking**, Durchwahl: -5113

**Landaj ligoj / Landesverbände**

**Wolfgang Bohr**, Durchwahl: -5114

**Administrado / Verwaltung**

**Barbara Brandenburg**

**Publika agado kaj pliklerigado /**

**Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung**

**Oliver Walz**, Durchwahl: -5116

**Retpaĝo, dissendolistoj / Internetauftritt,**

**Mailinglisten**

**Julia Noe**, Durchwahl: -5117

**Kongresoj kaj renkontiĝoj / Kongresse und**

**Treffen**

**Andreas Diemel**

**IT-aferoj / IT-Fragen**

**Franz Kruse**

**Jugendvertreterin / GEJ-komisiito**

**Cornelia Luszczek**, Durchwahl: -5118

**Germana Esperanto-Junularo /**

**Deutsche Esperanto-Jugend**

**Michaela Stegmaier**, Durchwahl: -5121

[gej.prezidanto@esperanto.de](mailto:gej.prezidanto@esperanto.de)

**Komisiitoj / Beauftragte**

[esperanto.de/deb/beauftragte](http://esperanto.de/deb/beauftragte)

Siehe auch [gea.eo.tel](http://gea.eo.tel)

**Verantwortliche für Presse- und**

**Öffentlichkeitsarbeit**

**Louis von Wunsch-Rolshoven**,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

[louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de](mailto:louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de)

**D-ro/Dr. Rainer Kurz**, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

[rainer.kurz@esperanto.de](mailto:rainer.kurz@esperanto.de)

**Medienecho**

**Hermann Kroppenber**, Durchwahl: -5121

[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)

**Libroservo / Bücherdienst**

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanz**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, [buchversand@esperanto.de](mailto:buchversand@esperanto.de), [www.esperanto.de/buchversand](http://www.esperanto.de/buchversand)

**Kontaktadresoj / Kontaktadressen**

**Julia Noe**, Bergiselstraße 3, 79111 Freiburg

**Pliaj adresoj / Weitere Adressen**

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /**

**Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

[www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej) (Netzpräsenz)

[gej.eo.tel](mailto:gej.eo.tel) (Kontakt Daten)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) /**

**Bildungszentrum des D.E.B.**

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj

kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,

die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)

1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

[ich@esperanto.de](mailto:ich@esperanto.de), [www.esperanto.de/ich](http://www.esperanto.de/ich)

**Germana Esperanto-Instituto /**

**Deutsches Esperanto-Institut**

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -421 (Tel), -431 (Tel),

-432 (Fax), [martin.haase@esperanto.de](mailto:martin.haase@esperanto.de),

[www.esperanto.de/dei](http://www.esperanto.de/dei)

**Germana Esperanto-Biblioteko /**

**Deutsche Esperanto-Bibliothek**

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

[biblioteko@esperanto-aalen.de](mailto:biblioteko@esperanto-aalen.de); [bibliothek-aalen@esperanto.de](mailto:bibliothek-aalen@esperanto.de); [www.esperantobibliothek.de](http://www.esperantobibliothek.de)

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**

**Andreas Emmerich**, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de)

(nur por FAME)

**Stiftung Mondo**

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart

eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio /**

**Österreichischer Esperanto-Verband**

[aej@esperanto.at](mailto:aej@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)

**Aŭstria Esperanto-Junularo /**

**Österreichische Esperanto-Jugend**

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

[aej@esperanto.at](mailto:aej@esperanto.at), <http://aej.esperanto.at>

**Esperantomuzeo Vieno /**

**Esperantomuseum Wien**

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift:

Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz

1, Postfach 25, 1015 Wien, [plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at), [www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-**

**beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA**

**Germanio / Deutschland**

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanz**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

**Aŭstrio / Österreich**

**Leopold Patek**, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel.

+43/66473611289,

[aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)

**Esperanto aktuell**

ISSN 0942-024 X

**Eldonisto / Herausgeber**

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**

**Stano Marček** (Martin/Slovakio),

**Yashovardhan Singh**, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -541

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**

**Uwe Stecher** (Österreich, El la mondo),

**Hermann Kroppenber** (Medienecho),

**Utho Maier** (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

**Presejo / Druck**

Alfaprint, Martin, Slovakio

**Esperanto aktuell** kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

**Esperanto aktuell** mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**

Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

**Kontribuoj / Beiträge**

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc

a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2018/4 ĝis

la 15-a de julio 2018. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format \*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de),

für Nr. 2018/3 bis zum 15. Juli 2018.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).

**Esperanto aktuell aperas ankaŭ por blinduloj**, danke al Uwe Stecher el Aŭstrio: en DOC-formato, kun priskribo de la fotoj.

Interesiĝantoj skribu al [punktor@live.at](mailto:punktor@live.at)

## Karaj legantoj,

preskaŭ 200 Esperanto-parolantoj kunvenis dum la pentekostaj tagoj en Zweibrücken apud la german-franca landlimo. Estis trilandna kongreso kun la partopreno de la franca, germana kaj luksemburga asocioj kaj gastoj el aliaj landoj. Necesis venki kelkajn organizajn defiojn: la altlernejo tie tre taŭgis por la eventoj de la kongreso, sed situas ekster la urbo. Prizorgi manĝojn kaj trinkaĵojn do aldoniĝis al la taskoj de la organizantoj. Sed ĉio bone finiĝis, kaj dum la konkluda kunveno eĉ aŭdiĝis laŭdo por la kvalito de la manĝo. Partoprenis pluraj libroservoj kun oferto simila al tiu de Universala Kongreso, okazis laborkunsidoj kaj jarĉefkunvenoj de partoprenantaj asocioj, krome deko da fakaj kunsidoj kaj prelegoj kun aŭ sen rilato al la kongresa temo “Esperanto – tutmonde ligita”. Podian diskutadon kaj retan elsendon pri “Esperanto kaj interreto” organizis dum unu vespero a teamo de <http://movada-vid.punkto.info>, Johannes kaj Eva. Kaj la duan vesperon muzik- kaj dancgrupoj pruvis al multkulturecon de la kongresurbo Zweibrücken, sekvataj de “La Kompanoj” el Francio kun kantoj de Jacques Brel en Esperanto.

La Reinhard-Selten-aŭlo (nomita laŭ la nobelpremiito kaj esperantisto, kiu mem iam prelegis en la altlernejo de Zweibrücken) dum tri tagoj fariĝis manĝejo, movada foiro kaj ĉefa renkontiĝejo de nia esperantista komunumo. Raportis lokaj gazetoj kaj la regiona televido, salutis la kongreson la ministroprezidantino de Rejnlando-Palatinato, la aganta urbestro de Zweibrücken, la urbestro de ĝia ĝemelurbo Boulogne-sur-Mer (bone konata al esperantistoj) kaj la prezidanto de la altlernejo, kiu mem partoprenis en la malfermo. Salutmesaĝoj venis ankaŭ de Margaret Zaleski-Zamenhof kaj de la UEA-prezidanto Mark Fettes.

Kadre de la kongresa temo ni diskutis kiel rilatigi nian propran tutmondecon – evidentan por esperantistoj jam dum 130 jaroj – kun la tutmondiĝo, kiun hodiaŭ ofertas la interreto kaj sur ĝia bazo aro da modernaj komunikiloj. Neniam estis pli facile informiĝi pri Esperanto (kaj pri ĉio alia), neniam pli facile eklemi nian lingvon (same kiel aliajn). En sia prelego Chuck Smith (kunfondinto de la Esperanto-Vikipedio, la Esperanta versio de la interreta kurso Duolingo kaj de la reta ligilo Amikumu) raportis pri la progreso de Esperanto en la reto. Li ankaŭ donis ekzemplojn, kiel el la reto povas fariĝi komunumo, kiu reale kunvenas kaj organiziĝas. Interesa aspekto: tio okazas ĉefe en Usono, ĝis nun ne konata kiel centro de esperantista vivo.



Alian agadkampon gravan por ni pritraktis Seán Ó Riain en sia enkonduka prelego. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio raportis pri ties ĉefaj okupoj: informi pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj ĝia kapablo kontribui al multlingveco en Eŭropo – do al deklarita celo de la Eŭropa Unio – kaj pri ĝia ebla kontribuo al la kreiĝo de eŭropa identeco. Ambaŭ temoj rilatigas la internacian lingvon al la aktuala debato pri stato kaj estonteco de la Eŭropa Unio: Esperanto ne staras flanke, sed povas esti parto de la solvo. La avantaĝojn de nia lingvo komencas malkovri ankaŭ interesa celgrupo, pri kiu en Zweibrücken raportis Chuck Smith kaj Charlotte Scherping Larsson: la multlingvuloj, kiuj de kelkaj jaroj kunvenas en “Polyglot Gatherings”. La fakto ke inter ili 20-30 procentoj jam parolas kaj uzas Esperanton estas bela pruvo ke nia lingvo ne celas anstataŭi aliajn, sed male subtenas multlingvecon kaj lingvan egalrajtecon.

La decida demando por mi post tia evento estas: ĉu valoris la multa laboro, kaj kiel ni nun daŭrigu? Mi foje aŭdis la argumenton ke en la hodiaŭa interreta mondo kongresoj ne plu estas bezonataj (same kiel lokaj grupkunvenoj kaj entute la ekzisto de Esperanto-asocioj). Mi ne konsentas kun tiu argumento: kunvenoj necesas jam pro statutaj kialoj, kaj vivanta lingvo almenaŭ jen kaj jen bezonas esti parolata en la reala mondo. Krome geamikoj volas havi okazon renkontiĝi, kaj kongresoj ĉiam estas bonaj okazoj por atentigi la reston de la mondo ke ni ekzistas, eĉ kreskas. En ideala kazo ni revenas de kongreso kun nova optimismo. Laŭ ĉiuj kriterioj la kongreso en Zweibrücken valoris la penon. Grandan dankon al la LKK kaj ĉiuj aliaj, kiuj ĝin helpis organizi! Kaj ĝis revido post unu jaro proksime al nia norda limo en Neumünster.

**Ulrich Brandenburg**  
Prezidanto de GEA

## Enhavtabelo/Inhalt

**1:** Mortis Hans-Dieter Platz (HDP).

Foto: Anna Striganova

**2:** Adresoj

**3:** Germana Esperanto-Asocio:

Karaj legantoj! Enhavtabelo.

**4-5:** Interkultura Centro Herzberg:

Vizito de la Esperanto-ĝardeno en Herzberg. Gravaj kunagadavokoj! Esperanto-Termine in Herzberg am Harz... die Esperanto-Stadt

**6-7:** Aŭstria Esperanto-Federacio: Memoro de la homaro. Opero en Esperanto en la praga Nacia Teatro

**8-9:** El la mondo: Kampanjo por informi pri Esperanto en la junulara festivalo Woodstock. Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo, la 21-an de majo 2018. UEA elektis en gvidan neregistaran grupon ĉe UN. Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj 2018 proklamita de UN

**10:** El la landaj ligoj: Esperanto-Tago de BAVELO ĉi-junie (09.06.2018) en Heilbronn. Treffen der Esperantisten aus Schleswig-Holstein, Hamburg und Niedersachsen in Marne (Kreis Dithmarschen) am 7. April 2018

**11-12:** El bibliotekoj kaj arkivoj: Folge 38 – “Spenden erbeten” möchten wir am liebsten gar nicht mehr hören – doch geht es nicht immer nur ums Geld!

**13-14:** Kalendaro

**15-16:** Germana Esperanto-Asocio: Norbert Lammert und Esperanto

**17-18:** Medienecho.

**19-22:** 15-16: Vojaĝraporto: Neforgesebla vojaĝo al Japanio 2017-10-26/11-07

**23-24:** Germana Esperanto-Asocio: 34. Internationale Frühlingswoche in Plauen (34. PSI) 30. März - 6. April 2018. 34-a Printempa Semajno Internacia en Plauen (34-a PSI) 30-a de marto – 6-a de aprilo 2018

**25-26:** El la fakaj ligoj:

Bibliaj Tagoj en 2018 kaj 2019. Esperanto auf dem 101. Katholikentag in Münster

**27-29:** kune – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Esperanto-tendumado en la Dömeyparko en Herzberg. KEKSO – La Kreema Esperanto-Kurso. Ĉiusemajna demando

**30:** Ni funebrias: Hans-Dieter Platz (1943-2018). Manfred Retzlaff (1938-2018)

**31:** Reklamo: Luminesk' 2018/2019

**32:** Neues Werberollo.

Ripozi sur Esperantobenko



# Vizito de la Esperanto-ĝardeno en Herzberg

En la Esperanto-urbo Herzberg jam estas multaj Esperanto-rilataj vidindaĵoj. Dumsomere multaj volonte enrigardas pro la belaj multspeciaj floroj kaj plantoj.

**Ĝ**is antaŭ kelkaj jaroj ni havis la raran Esperanto-rozon; ĝi mortis pro tro frostaj vintroj. Tamen ni havas la unikan “Zamenhof-grimprozujon”. Ĝi estis bredita en la jaro 1934 fare de sinjoro Gustav Brada (rozbredisto) el Bohemio.

Du Esperanto-Klematitoj bone fartas en la ĝardeno. La “Rozo de la espero”, relative nova bredaĵo, ne mankas.



Hazarde ni trovis specialan herbospecion “Esperanto”. Ni mendis ĝin ĉe ia retfirmao, sed ĝi ankoraŭ ne alvenis.

En la “Esperanto-ĝardeno” ekzistas angulo kun pli ol dek diversaj spic-herboj. Gastoj povas utigili ilin.

Pli ol cent plantoj kaj floroj havas dulingvajn nomŝildojn. Ankaŭ tio estas metodo por praktika lernado kaj uzado de Esperanto en natura medio. Speciala Esperanto-pavilono (kun WLAN-ebleco) ofte allogas gastojn.

Ĉe la proksima urba rando ekzistas “Esperanto-herbejo”. Ĝi ne estas luksa, sed taŭgas por tendumantoj. Cetere nutraĵvendejo estas nur 300 metrojn for de tie. Bonvenon en Esperanto-Centro (ICH) en la Esperanto-urbo Herzberg!

## Gravaj kunagadalvokoj!

Por la preparado de du gravaj ekspozicioj en en la kastela muzeo de Herzberg (Esperanto-urbo) ni bezonos helpantojn, kiuj preparas la materialojn, verkas tekstojn, eble eĉ kajerojn, respektive libretojn ktp.

**F**ine de septembro 2018 ni inaŭguros la elstaran ekspozicion “Tibor Sekelj” pro la 30-a mortotago. Li estis mondfama Esperanto-pioniro, kiu vivis en multaj landoj kaj ankaŭ sukcese disvastigis Esperanton, ekz.



Tibor Sekelj kaj Werner Bormann en Pekino, 1986



# Esperanto-Termine in Herzberg am Harz... die Esperanto-Stadt

**Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6,  
DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio,  
☎ 05521-5983, ✉ [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)**

**Mittwochs ab 16:30 h Esperanto-Klub per LEB**  
(Kursus, Unterhaltung, Informationen, Gäste), ICH

Neue Sonderausstellung "Demokratie ohne Grenzen",  
Museum des Welfenschlosses Herzberg (Esp.-Plattform),  
zweisprachig (per Bundesprogramm "Demokratie leben")  
mittwochs bis sonntags 11 h bis 16 h

**20.06.18 Mi** 16 h Informationen über Esperanto & die  
Esperanto-Stadt im Martin-Luther-Haus Herzberg

**28.06.18 Fr** 14h - 18h Esperanto- Infostand mit  
Sprachspielen beim Fest im Park (der Zukuwe Herzberg)

**28.06.18 – 01.07.18** 82a GEA-Klerigseminario  
(prelegantoj s-ro Yashovardan, s-ino Anina Stecay, s-ro  
Martin Ptasinski, Zsófia Kóródy, Peter Zilvar, kun  
interesa kadroprogramo kaj ekskurso, bv. aliĝi! Dankon!

**01.07.18 – 08.07.18** Esperanto-Kursoj (Somera Esperanto-  
Perfektigo / SEP), ICH en Herzberg

Por komencantoj, progresintoj, parolantoj, tendumantoj  
kaj aliaj (kun ekskursoj, komunaj manĝaĵideoj, ktp.), varia  
programo kun migradoj, naĝado, ekskursoj, ktp.

**08.07.18 – 15.07.18** Internaciaj Esperanto-Kursoj, ICH en  
Herzberg

**14.07.18** Naskiĝtaga festo "12-jara Esperanto-urbo

Herzberg" kun festprogramo:

10:30 h - 11:30 h Herzberger Samstag, Ralph Glomp singt  
Schlager in Esperanto (auf der Marktplatzbühne)

13:00 h Nia jam tradicia kradrostadfestoj (en la E-Ĝardeno)

14.07.18 (vespere) + 15.07.18 Ekzamenoj de Germana  
Esperanto-Instituto en Herzberg, bv. aliĝi ĝis la 31.05.18!

**20.07.18 – 27.07.18** 13a Somera Arbara Lernejo  
(Gelernantoj el Herzberg & Góra) en Góra/PL

**28.09.18 – 03.10.18** TORPEDO 13 (Pedagogiaj Tagoj en  
Herzberg) per AGEI & GEA

**29.09.18** 11 h Inaŭguro de la Granda Tibor Sekelj-  
ekspozicio en la Kastela Muzeo (Kvar ekspoziciaj-salonoj)

**05.10.18 – 07.10.18** E-Planungsseminar in unserer  
Partnerstadt Góra/PL (im Jubiläumsjahr der  
Städtepartnerschaft)

**Ab Oktober 2018** 14. Esperanto-Sonderausstellung im  
Schlossmuseum (Städtepartnerschaft Herzberg + Tibor  
Sekelj)

**24.10.18** (Mi) Tag der Bibliotheken (Nacht der  
Bibliotheken in der Bibliothek des Esperanto-Centros)

**26.10.18 – 28.10.18** DEB-Verbandsratssitzung in Herzberg

**09.11.18 – 11.11.18** Esperanto-Wochenendkurse in  
Herzberg

**14.12.18 – 16.12.18** GEA-Klerigseminario kun  
Kristnaska kaj Zamenhof-festo en la Esperanto-urbo



► en Nepalo kaj en Sudameriko. Tibor Sekelj verkis famajn  
librojn. Multajn librojn oni tradukis el Esperanto al aliaj  
lingvoj. Li estis mondfama esplorvojaĝisto kaj etnologo.  
Dum longa tempo li estis la prezidanto de la Monda  
Verkista Asocio, elstara aŭtoro pri multaj temoj, televida  
ĵurnalisto ktp. Pli ol dek lingvojn li regis flue kaj pli ol  
dudek aliajn rudimente.

Liaj elstaraj historiaj kulturkolektaĵoj troviĝas en multaj  
famaj muzeoj, kiel en Zagrebo (Kroata Nacia Muzeo).

La vidvino vivas en Hungario kaj ŝi kunportos  
multajn historiajn materialojn, ekz. maskojn, historiajn

muzikinstrumentojn, rarajn ornamaĵojn, librojn ktp. Ni  
volas inviti multajn celgrupojn, nome esperantistojn,  
etnologojn, ĵurnalistojn, politikistojn ktp. La ekspozicion  
ni prezentos en kvar sepecialaj salonoj.

Certe ĝi fariĝos elstara kaj unika ekspozicio kun granda  
reklamefiko.

Ĉu iu el vi ankoraŭ posedas materialojn (fotojn,  
korespondaĵojn ktp.) kun, resp. pri Tibor Sekelj? Ĉu vi  
povos pruntedoni tion al ni?

Krome meze de oktobro, pro la 25-jara jubileo de la  
ĝemelurboj Herzberg kaj Góra/PL, ni ofertas jam la 14-an  
temoekspozicion pri tio. Ni intencas verki memorlibreton  
kun multaj fotoj en du aŭ tri lingvoj.

Same pri multaj aliaj temoj, ekz. por la arkivoj kiel  
GEA-gazetarkivo, bibliotekoj ktp. ni bezonas seriozajn  
honoroficajn kunlaborantojn.

Bv. kontakti Peter Zilvar aŭ Zsófia Kóródy en Herzberg.  
Ancipe ni dankas al vi pro viaj kunsubtenoj!





# Opero en Esperanto en la praga Nacia Teatro

La 7-an de aprilo okazis en Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago monda premiero de la opero *Sternenhoch* de la aŭtoro Ivan Acher, laŭ la romano de Ladislav Klíma (1878–1928) *Suferado de la princo Sternenhoch*. La opero estas kantata komplete en Esperanto. Plej interese estas, ke en la fono de tiu grava projekto staras neniu esperantisto – la ideo venis de Acher mem, kvankam li ne scipovas Esperanton, sed jes orientiĝas en ĝi pasive.

**L**i verkis la libreton ĉeĥe, petis tradukon al Esperanto de Miroslav Malovec (inter alie aŭtoro de la ĵus eldonita *Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro*) kaj nur sekve, havante la Esperantan tekston je dispono, li komponis la muzikon.

La romano de Klíma estas morbida kaj ankaŭ la intrigo de la opero restas morbida: La princo Sternenhoch, stranga, ebriema kaj fiera, premita de siaj amikoj, ke li finfine edziĝu, elektas ene de iu sovaĝa festeno malbelan purigistinon Helga, filinon de pensiigita ĉefleŭtenanto kun putino, al kiu li sentas naŭzon, sed samtempe amon. Ŝi malamas lin, tamen naskas lian bebon; knabeton, pri kiu Sternenhoch fieras. Sed ŝi estas post la nasko furioza.

Mi lasu kanti Helgan: *Vi makulis min por ĉiam – ne per koito, sed per tio, ke vi devigis min porti dum naŭ monatoj en mi vian abomenaĵon, ke li identiĝis kun mi kaj mi kun li – mi freneziĝis! Li devas pereji!* Do ŝi mortigas la knabeton je la kapo de Sternenhoch kaj sekvas la vokon de sia koro – al sia amanto.

La fino estas same morbida: Sternenhoch metas Helgan en forgesejon, kie ŝi mortas, sed malgraŭ ĉio ĉi li sentas amon al ŝi kaj ofte sonĝe revas pri ŝi. Je la fino de la romano kaj ankaŭ en la fono de la opero li freneze haluciniĝante venas al ŝia kadavro kaj tie kun ŝi amoras.

Dum la tuta spektaklo intermiksiĝas la sonĝoj de Sternenhoch kun la realeco. Dume sonas perfektaj arioj, kantitaj de pintaj operkantistoj, kaj dancado en altkvalitaj ĥoreografio kaj plenumo.

Malgraŭ mia timo, kaŭzita de la kono de la libreto (miaguste malplaĉa), mi devas konfesi, ke de la tuto mi havis tre pozitivan impreson. Mi eble proksimigu ankaŭ la voĉojn de la ĉefaj rolantoj. Helga – soprano; patro de Helga – baso; Kuhmist, orakolino kaj sorĉistino – mezosoprano; poeto kaj amanto de Helga – baritono; rakontanto – basbaritono. Ĉiujn ĉi rolojn la aŭtoro komponis jam pensante pri konkretaj kantistoj, kun kiuj li jam antaŭe sukcese kunlaboris. Tamen problemon



Foto: Hana Smejkalová

li havis kun la trovo de la ĉefrolulo Sternenhoch. Li imagis precizan tenoron kun bela kontratenoro; provis kelkajn kantistojn, ĉeĥajn, italajn kaj polajn, kaj finfine hazarde li aŭdis en nordbohemia operejo en la urbo Ústí nad Labem precize tiun voĉon, kiun li serĉis. Ĝi apartenis al la bulgara kantisto Sergej Kostov, kiu nur tre mallonge estis en Ĉeĥio. Li komence timis eniri la Nacian Teatron, ĉar ne parolante la ĉeĥan, nek la anglan, li timis komunikajn problemojn, sed feliĉe li akceptis la rolon kaj havis nekredoblan aplaŭdon (kion eblas tamen diri pri la tuto). Mi supozas, ke per tiu perfekta plenumo li startigas sukcesplenan karieron.

En la programkajero troviĝas kompleta libreto en Esperanto kun la traduko en la ĉeĥan (ekzistas ankaŭ programkajero en la angla, do tie en la anglan). Al la premiero estis invitita ankaŭ M. Malovec kaj ene de la mallonga solenado post la spektaklo en la vestiblo Ivan Acher prezentis lin kiel tradukinton en Esperanton.

Antaŭ ol mi iris viziti la operon, mi kontaktis la aŭtoron kaj petis lin pri intervjuo, kion li volonte akceptis. Al mia demando, kial li elektis ĝuste Esperanton, li respondis, ke li deziris, ke oni ne strebu per la oreloj kompreni la vortojn, kio dum arioj ofte apenaŭ eblas, kaj povante legi supre la vortojn oni povu fokusiĝi al la percepto de la melodio. Kaj Esperanto pro siaj klaraj vokaloj en ĉiu silabo, kaj akcento sur la antaŭlasta, ŝajnas al li kvazaŭ lingvo kreita por muziko – kaj do li uzis ĝin tiel. Krome ĝi sone similas al la itala, la plej kutima lingvo rilate operojn.

La opero estis prezentita jam kvarfoje kaj kiel mi ĵus kontrolis ĉe la reta mendilo, plia prezentado en junio (kaj la lasta antaŭ la teatra somera libertempo) estas ankaŭ jam preskaŭ disvendita. Bedaŭrinde post la ferio ĝi longe ne estas enplanita kaj denove ĝi ekaperos en la scenejo nur fine de la jaro.

Petro Chrdle





## Kampanjo por informi pri Esperanto en la junulara festivalo Woodstock

UEA kaj la Eŭropa Komisiono de UEA petas vian helpon: Helpu nin kolekti € 4 500 por realigi Esperantan agadon en aŭgusto 2018, dum la junulara festivalo Woodstock\*. Al ĉiuj 2 € donacotaj, UEA aldonos 1 €; el propra buĝeto, tiel ke organizantoj ricevos entute la sumon de € 4500, almenaŭ. Vi povas sendi vian donacon al UEA konto "Informado", aldonante kiel celon: "por Woodstock" <https://luea.org/alighoj/donacoj>.

Woodstock estas mondfama kultura festivalo, kie partoprenos pli ol 600 000 junuloj inter la 2-a kaj 4-a de aŭgusto 2018. Filmeton kaj pliajn informojn vi trovos ĉe [www.gazetaro.org/woodstock](http://www.gazetaro.org/woodstock)

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 732

\*Noto de la redakcio: la festivalo en 2018 ŝanĝis la nomon al *PolAndRock Festival*. Kadre de ĝi plu funkcios Multkultura Vilaĝo Esperanto kun Esperanto-kursoj (sur la foto), ekspozicio kaj diversaj programeroj.



Stano Marček gvidas la oftajn Esperanto-kursojn

kaj socioj kiuj konsistigas la homaron. Kiel fonto de interŝanĝo, novigo kaj kreemo, kultura diverseco estas same necesa al la homaro kiel estas biodiverseco al la naturo. En tiu senco, ĝi estas la komuna heredaĵo de la homaro kaj rekoninda kaj asertinda favore al la nuna kaj estontaj generacioj."

Artikolo 5 siavice atentigas, ke "Kulturaj rajtoj estas integra parto de la homaj rajtoj, kiuj estas universalaj, nedivideblaj kaj interdependaj. La florado de krea diverseco neprigas la plenan realigon de kulturaj rajtoj; sekve, ĉiuj homoj havas la rajton esprimi sin kaj krei kaj disvastigi siajn verkojn en la lingvo, kiun ili mem elektas, precipe en sia denaska lingvo; ĉiuj personoj rajtas al altkvalitaj edukado kaj trejnado, kiuj plene respektas ilian kulturen identecon; kaj ĉiuj homoj rajtas partopreni kulturen vivon, kiun ili mem elektas, kaj plenumi siajn proprajn kulturajn morojn, konforme al respekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj."

Universala Esperanto-Asocio subtenas la klopodojn de Unesko kaj de Unuiĝintaj Nacioj konservi kaj fortigi lingvan diversecon, kaj samtempe serĉi vojojn por transponti tiun diversecon apoge al la homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo. La asocio subtenas la sentojn esprimitajn en Artikolo 6 de la Deklaracio: "Samtempe kun sekurigo de la libera fluo de ideoj per vortoj kaj bildoj, oni zorgu ke ĉiuj kulturoj povu esprimi sin kaj konatigi sin. Libereco de esprimo, komunikmedia pluralismo, multlingvismo, egala aliro al belarto kaj al scienca kaj teknika scio, inkluzive en cifereca formo, kaj la ebleco, ke ĉiuj kulturoj havu aliron al la iloj de esprimado kaj disvastigo, estas la garantiiloj de kultura diverseco."

La Agadplano, aprobita de la Ĝenerala Konferenco por realigo de la Deklaracio, enhavas tri promesojn kiuj rilatas al lingvoj, nome:

Protektion de la lingva heredaĵo de la homaro kaj subtenado de esprimo, kreo kaj disvastigo en kiel eble plej granda nombro da lingvoj.

Instigon de lingva diverseco; samtempe respektu al la denaska lingvo je ĉiuj niveloj de edukado, ĉie kie tio eblas, kaj kuraĝigon al lernado de pluraj lingvoj ekde la plej frua aĝo.

Antaŭenigon de lingva diverseco en kiberspaco kaj kuraĝigon de universala aliro tra la tutmonda reto al ĉiuj informoj en la publika sfero.

Nia asocio instigas siajn membrojn festi kaj apogi kulturen diversecon, kaj utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel rimedon por engaĝiĝi kun la diversaj kulturoj de la mondo en spirito de reciprokeco kaj respekto. Se la "dialogo" menciita en la titolo de la nuna Tago portu sian plenan signifon, devas nepre temi pri dudirekta komunikado kiel eble plej senpera kaj

## Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo, la 21-an de majo 2018

Ĉiujare la 21-an de majo la komunumo de Unuiĝintaj Nacioj festas la Mondan Tagon por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo. Tiu festado unue okazis en la jaro 2002, sekve de aprobo fare de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, en novembro de la antaŭa jaro, de la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco.

Laŭ Artikolo 1 de la Deklaracio, "Tiu diverseco estas enkorpigita en la unikeco kaj plureco de la identoj de la grupoj



signifoplena. La ĉi-jara festa mesaĝo pri la Tago de Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, emfazas “la neceson protekti la diversajn formojn de kultura esprimiĝo; lingvojn, artojn, metiojn, vivstilojn; precipe tiujn de minoritataj popoloj, tiel ke ili ne forviŝiĝu fare de la normiga movado kiu akompanas tutmondiĝon.” Ŝi citas la vortojn de Mahatma Gandhi: “Mi ne deziras, ke mia domo estu murigita je ĉiuj flankoj, nek ke la fenestroj estu ŝtopitaj. Mi deziras, ke la kulturo de ĉiuj landoj estu disblovita tra mia domo kiel eble plej libere.” Pro tio s-ino Azoulay sugestas: “kulturo ne estas heredaĵo ŝtone fiksita, sed heredaĵo vivanta kaj spiranta, malferma al influoj kaj dialogo, permesanta al ni adaptiĝi pli pace al la mondaj ŝanĝiĝoj.”

Ni gratulas Uneskon kaj Unuiĝintajn Naciojn pro iliaj klopodoj antaŭenigi kulturen diversecon, kaj tian daŭripovan evoluigon kiu konservas tiun diversecon, kaj promesas nian aktivan subtenon al tiuj klopodoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 735

## UEA elektiĝis en gvidan neregistaran grupon ĉe UN

Rezulte de diplomaciaj elpaŝoj en Novjorko kaj Ĝenevo, UEA elektiĝis por trijara periodo en la estraron de internacia kunordiga grupo de neregistaraj organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konata per la mallongigo CoNGO (prononcu “kongo”).

Pli formale “La Konferenco de NRO-oj en Konsultaj Rilatoj kun UN”, CoNGO funkcias kiel tegmenta asocio por pli ol 500 organizoj, kiuj tenas konsultajn rilatojn kun ECOSOC, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. La celo de CoNGO estas faciligi la partoprenon de NROj en la UN-sistemo kaj kunlabori kun UN por komunaj celoj, ekzemple la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

UEA jam delonge estas membro de CoNGO kaj partoprenas en ties kunvenoj kaj laborgrupoj. Lastatempe ĝi aparte aktivas en du komitatoj de CoNGO, pri paco (Vieno) kaj pri edukado (Novjorko), kaj krome akiris bonan reputacion en Ĝenevo pro siaj intervenoj en diskutoj pri homaj rajtoj. Surbaze de tiu longdaŭra kunlaboro, dum sia marta jarkunveno en Ĝenevo, la membroj de CoNGO elektis UEA al sia estraro por la periodo 2018-2021.

Kiel estrarano de CoNGO, UEA kunlaboras kun 17 aliaj grandaj internaciaj NROj, sub la gvido de prezidanto Liberato Bautista, kiu laboras en Novjorko. Inter aliaj asocioj-estraranoj troviĝas Soka Gakkai Internacia, la Internacia Alianco de Virinoj, Soroptimist International, Internacia Humanista kaj Etika Unio, kaj Internacia Unio de Psikologia Scienco. La estraro kunvenas rotacie en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, kie UEA estas reprezentata de, respektive, prof. Humphrey Tonkin, Stefano Keller, kaj prof. Hans-Michael Maitzen.

“Kunlaboro kun aliaj internaciaj asocioj estas grava elemento en la strategio de UEA pri Konsciigo,” komentas d-ro Mark Fettes, la Prezidanto de UEA. “Tio gajnas por ni amikojn, donas okazojn por trejni niajn aktivulojn, kaj malfermas pordojn al komunaj projektoj en kiu Esperanto ludas gravan rolon.

Mi gratulas niajn reprezentantojn, ke ili tiel bone preparis la vojon al ĉi tiu signifoplena atingo. Ni energie plukonstruos sur ĝi!”

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 736

## Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj 2018 proklamita de UN

La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Familioj estas “Familioj kaj inkluzivaj socioj.” Nome de la miloj da Esperanto-parolantaj familioj, kiujn ĝi bonvenigis inter si tra la jaroj, Universala Esperanto-Asocio esprimas sian daŭran sindediĉon al socia inkluzivo de ĉiuj familianoj, protekto de iliaj homaj rajtoj, kaj helpo al ĉiuj anoj de familio tra la mondo kiuj, lau la spirito de la 16-a Celoj por Daŭripova Evoluigo, “Paco, Justeco kaj Fortaj Institucioj”, serĉas helpon de la internacia komunumo por elteni dislokigon, militon, ekstreman malriĉon, kaj malsanon. Multaj tiaj familioj estas malhelpataj esprimi siajn bezonojn pro lingvaj bariloj, manko de aliro al edukado, kaj socia marĝenigo.

Ekde sia fondiĝo en 1908, nia Asocio laboras por transporti la dividajn inter homoj kaj nacioj. Ne malofte, tiuj agadoj kondukas al internaciaj geedziĝoj kaj la starigo de familioj kies infanoj ĉehejmas en pli ol unu kulturo. Antaŭ cent jaroj, meze de la Unua Mondmilito, la juna Asocio laboris, el sia sidejo en la neutrala Svislando, por utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel ilon por reunigi familiojn dividitajn de la milito, kaj por starigi kontakton kun familianoj izolitaj de siaj parencoj. En pacaj periodoj, ni celis disvastigi la lernadon kaj instruadon de Esperanto kiel vojon por malfermi la mondon al infanoj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj egale; al ĉiuspecaj familioj, ĝi reprezentas unikan manieron por partopreni en internacia komunumo ligita per vojaĝado, literaturo kaj aliaj komunaj spertoj. Hodiaŭ la Asocio organizas ĉiujaran tutmondan renkontiĝon de Esperanto-parolantaj infanoj, kaj niaj aliĝintaj asocioj en pluraj landoj aranĝas ĉiujare kunvenojn de Esperanto-parolantaj familioj. La temo de la nuna Internacia Tago de Familioj estas sekve aktuala kaj laŭtema al la internaciaj defioj kiujn niaj membroj klopodas fronti tra la mondo responde al la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

En la hodiaŭa tago, en mondo kie multe tro da familioj estas dividitaj au dislokitaj de milito kaj politika subpremo, kie multe tro da familioj vivas en malriĉeco au sub minaco de malsano, kie multe tro da familioj vane serĉas ekvilibron inter laboro kaj familio, ni esprimas nian firman deziron, nome de ĉiuj parolantoj de Esperanto, labori por pli sana, pli egaleca, pli tolerema kaj pli paca mondo en kiu la familia vivo estu plifortigita en maniero kiu avantaĝas ĉiujn familiojn kaj ĉiujn individuajn familianojn.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 734



## **Esperanto-Tago de BAVELO ĉi-junie (09.06.2018) en Heilbronn**

**Sian jarĉefkunvenon BAVELO okazigas ĉiujare en alia urbo de la federacia lando Baden-Virtembergo. Tion BAVELO intence faras por, laŭ la devizo de siaj statutoj, apogi la lokan, respektive regionan Esperanto-agadon.**

**H**eilbronn situas en la Nordo de la asocia agadregiono. Ĝi estas vizitinda urbo, post la teruraj detruoj en la Dua Mondmilitoj bele rekonstruita. Kaj ties Esperanto-grupo pli-malpli monate kunvenas por neformala lerngrupo.

Rimarkindaj estas tri personecoj, elstaraj en la historio de Esperanto en Heilbronn.

Adolf Schwarz naskiĝis en 1906 en Trier kaj mortis en 1996 en Mainhardt. Li estis marksisto-socialisto kaj multe aktivis en la laborista Esperanto-movado. Profesie li estis komercisto en la konata firmao Lidl, kies sidejo situis tiam en Heilbronn, kaj li multe helpis donace, organize kaj verkante por Esperanto-periodaĵoj. Li profunde kontraŭis al la hitlera reĝimo, sed eskapis el la minaco de koncentrejo, ĉar li multe vivis tiam en eksterlando.

Bruno Vogelmann naskiĝis en 1909 en Heilbronn kaj mortis en 2002 en Crailsheim. Li elstaris kiel verkisto de komerca fakvortaro kaj de unika esperantlingva filozofia verko "La Nova Realismo", kiu estis tradukita en pli ol dudek lingvojn. Ankaŭ Bruno Vogelmann estis komercisto kaj li estis gvidanto de kemia fabriko en Crailsheim post la dum milita detruo de la gepatra entrepreno en Heilbronn. Lia decidita opozicio al Hitler kaŭzis, ke li kvar jarojn devis esti en koncentrejo. Intensa okupiĝo pri la du kontrastaj doktrinoj, la "dogmoj" de la kristanismo kaj la "ideologioj" de la marksismo-socialismo kondukis lin al la malakcepto de dogmoj/ideologioj ĝenerale, sed al la konvinko, ke "kontrasto estas unu". Por "ekkogni" (tio estas: filozofie ekkoni) tion, ne sufiĉas resti supraĵe ĉe la "akcesoraĵoj" de la doktrinoj, sed necesas enpenetri en la profundon de la "realo". Tiu "nova realismo" estas konsekvenco el tiu ĉi "nova pensado".

Siegfried Krüger estis persona amiko de Bruno Vogelmann, tiel, ke Bruno Vogelmann petis Siegfried Krüger, ke li parolu la salutvortojn de la esperantistaro dum la funebra ceremonio ĉe la entombigo de Vogelmann. Siegfried Krüger naskiĝis en 1935 en Berlino. Li studis elektroteknikon en Berlino kaj ekde 1957 laboris kiel inĝeniero ĉe la Germana Ŝtata Fervojo (DB, Deutsche Bahn) en Stuttgart. En la kulturgrupo de la Fervoja Sociala Organizo de DB Siegfried en 1967 lernis Esperanton, kaj dum pluraj jaroj li en la Popola Altlernejo de Heilbronn ankaŭ instruis Esperanton.

Siegfried Krüger estas membro de GEFA, IFEF, GEA (sekve ankaŭ de BAVELO), UEA kaj KELI. Ekde 1999 li dum multaj jaroj estis kasisto de KELI. En diversaj funkcioj Siegfried organizis aŭ kunorganizis kongresojn: de la fervojistoj, de KELI, de BAVELO. Li fleugas multajn kontaktojn, kaj por multaj homoj li estas bona konsilanto en Esperanto-aferoj.

**Alois Eder**

## **Am 7. April 2018 trafen sich Esperantisten aus Schleswig- Holstein, Hamburg und Nie- dersachsen in Marne (Kreis Dithmarschen).**

**Das 2009 eröffnete Kultur- und Bürgerhaus  
(KBH) erhielt 2011 einen Preis für  
hervorragende Architektur.**

**D**ie Teilnehmer des Treffens konnten hier in einer sehr modernen und angenehmen Atmosphäre arbeiten. Nach einem kurzen Imbiss begann die Veranstaltung im mit einem Beamer ausgestatteten Großen Saal mit einem Vortrag von Klaus Friese, Autor und Übersetzer aus Hamburg, über sein Buch "Fahrtrichtung Esperanto". Albert Bielenberg berichtete im Anschluss von seinen Erlebnissen bei den Esperantokongressen in China und Japan.

Daniel und Åsa zeigten ihren Zeichentrickfilm "Mi soifas!". Dieser war ihr Beitrag zum Filmwettbewerb "Teo kaj Amo" (Tee und Liebe) von Radio China International (Ĉina Radio Internacia), der als Siegertitel in der Kategorie "Bester Zeichentrickfilm" ausgezeichnet wurde. Es zeigt, dass sich Norddeutschland zu einem Schwerpunkt des kulturellen und literarischen Schaffens der Esperanto-Bewegung entwickelt hat.

Im Anschluss folgte bei Kaffee und Kuchen im kleinen Saal eine zwanglose Diskussion in Esperanto und auch in deutscher Sprache. Für einige Teilnehmer bilden diese Zusammenkünfte die einzige Möglichkeit im Jahr, die internationale Sprache praktisch anzuwenden, und so überwog der Esperanto-Anteil beim Sprechen.

Den Schlusspunkt setzte bei sonnigem Frühlingwetter (eine wichtige Zutat zu einem erfolgreichen Esperanto-Treffen) eine Führung durch die Innenstadt. Marne ist ein ausgesprochen hübscher Ort mit über 5000 Einwohnern in fast schon greifbarer Nähe zur Elbe. Sie ist Zentrum des Kohl-Anbaus, des norddeutschen Karnevals und Sitz einer Brauerei. Die Neugierde der Esperantisten führte die Gruppe in die Maria-Magdalenen-Kirche, in der die zufällig anwesende Küsterin einen Überblick über die Geschichte des Gotteshauses gab.

**Michael Lennartz**



## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Folge 38 – “Spenden erbeten” möchten wir am liebsten gar nicht mehr hören – doch geht es nicht immer nur ums Geld!

Natürlich nennt Heines Aphorismus, denn ich schon öfter zitierte, eine bleibende Wahrheit; denn Geld ist immer willkommen: “Geld ist rund und rollt weg, aber Bildung bleibt”, obwohl Heine auch textete: “Geld ist der Gott unserer Zeit”.

Auch Dichterst Goethe kommt mir da in den Sinn: “Nach Golde drängt, am Golde hängt doch alles! Ach, wir Armen!” – aber auch “Zwei Seelen wohnen, ach, in meiner Brust.” Natürlich braucht eine Plansprachensammlung wie wir Mittel, um aktuell zu bleiben, und dennoch muss man sich immer vor Augen halten, dass man mit Geld nicht alles kaufen kann. Und genau dort, wo es uns und unserer Sammlung am meisten schmerzt, gilt das verstärkt!

Wird das ein erneuter Bettelbrief an unsere Leser? In gewisser Weise ja, und warum es dabei nicht bloß um Geld geht, das mögen die folgenden Zeilen etwas erhellen.

Wenn in einer Reihe von Zeitschriftenheften, welche darüber hinaus auch oft noch unregelmäßig erschienen, einzelne Hefte fehlen und dazu deren Ausgabejahr etwas weiter zurück liegt, dann kann es ein fast unmögliches Unterfangen darstellen, diese zu beschaffen, ob auf dem Wege des Tauschs oder im antiquarischen Handel oder auch per Fernleih-Kopie.

Gibt es das wirklich? Leider ja, und ich stoße immer öfter auf solche doch schmerzlichen Lücken in unserem Bestand. Spontan kommt mir da diese in den Sinn:

Seit 1992 gibt es bei UEA die *rondo familia*, und ab 1994 erschien *Familia Esperanto* als deren Organ. Bei UEA findet sich ein “Regularo pri la komisiono de Rondo Familia”, das als dessen essenzielle Aufgabe nennt: “eldonas informilojn kaj materialojn”. Doch das bedeutet nicht automatisch, dass diese Seiten gut gepflegt oder gar komplett wären, ganz im Gegenteil! Kinder scheinen bei UEA nicht (mehr) hoch im Kurs zu stehen, und bezüglich Kindertreffen oder –kongress wird nur auf private Seiten verwiesen, die schon an die 10 Jahre alt sind. Die UEA-eigene Netzseite [uea.org/kongresoj/iik.html](http://uea.org/kongresoj/iik.html) scheint das Erneuern des Netzauftritts nicht überlebt zu haben (statt Informationen findet man nur noch ein altes regularo ([uea.org/teko/regularoj/regularo\\_iik](http://uea.org/teko/regularoj/regularo_iik))).

Leider sind die Inhalte der Google-Gruppe (-Forums) denask öffentlich nicht zugänglich (Absicht, um Neugier zu wecken oder Datenschutz für Familien und Kinder?).

Jedenfalls: unsere Lücken bei der *Familia Esperanto*, *neregula cirkulaĵo de rondo familia* lassen sich unter Rückgriff auf die UEA-Seiten nicht schließen. Wir haben nur die Nummern (2000)1.2 sowie (2003)10 und (2004)11 in Papierform und die Nummern (2001)6-(2003)10 als pdf; dazu noch (2007)46-(2011)50; schon diese inkonsistente Nummerierung deutet ein gewisses Chaos an. Dennoch die konkrete Frage: Wer könnte uns diese noch fehlenden Nummern abgeben: (2000)3-(2001)5, (2006?)45?

Das war nur mal ein erstes Beispiel, und es betrifft nur die jüngste Vergangenheit! Zeitschriften, die sich an Kinder und deren Eltern richteten, gab es viele. Ich zähle mal auf, ohne den geringsten Anspruch auf Vollständigkeit zu erheben, ohne Wertung, ohne chronologische Ordnung:

Ab 1948 erschien im Verlag Esperanto Press mit dem *bulteno gepatra* eine Familienzeitschrift (bis 1960). Davon benötigen wir unbedingt noch die Nummern 1(1948)3.5, 5(1952)23, 6(1953)34.35, 7(1954)36, 11(1958)61. Titel und Untertitel haben immer wieder gewechselt; ab 1967 wurde es fortgeführt als *gepatra bulteno*, das wir komplett besitzen.

Ab 1954 gab es mit *nia voĉeto* ein “SAT-bulteno por geknaboj”. Zuerst erschienen mindestens 18 Nummern, von denen wir sehr wenige besitzen. Dann kam es ab 1962 zu einer nova serio mit weiteren 39 Ausgaben (bis 1971).

Ab Nummer 40 setzte SATEB (der britische Ableger) unter neuem Titel *kalejdoskopio* gleichsam als 3. Serie fort, davon erschienen ebenfalls 40 Nummern, so dass es diese Zeitschrift in mehr als einem Vierteljahrhundert auf fast 100 Ausgaben brachte.

Kuriosität am Rande: die Nummer 16(1971)40 von *nia voĉeto* fungierte gleichzeitig (und ist identisch mit) als 1(1972)1 von *kalejdoskopio*; also müsste man dessen Nummern [statt 1(1972)1-10(1981)40] fortlaufend eher so notieren: 17(1972)40- 26(1981)79. Wer uns Hefte davon abgeben kann: da wäre uns jede Nummer willkommen, selbst wenn wir davon schon ein Exemplar hätten!

Zwischen Mai 1964 und Dez. 1968 gab es *antaŭen ĉiam*, monata organo de nederlandaj praktikantaj E-amatoroj, dediĉita al la estonta infano kosmopolita, mit jährlich 10 Heften und dem weiteren Untertitel *neutrala, esperantista sendependa Zamenhofa lekturgazeto* (insgesamt 45 Hefte mit 762 Seiten, 31-38 gemeinsam mit *neŭtrala Esperantisto*). Uns fehlen davon diese Nummern: 1(1964)3.4.8, 2(1965)15, 4(1967)30.31.33.34.35.38, 5(1968)39.40.44.

Kontraste al vojaĝo kiel kutima turisto, kiu ja tranoktadas en pli aŭ malpli luksa hotelo, mi havis la eblon vidi kaj senti ege dense, kiamaniere vivas japanoj. Ĉiu tago en la domo de Goro kaj ties ĉarma familio estis unika travivaĵo. Jam la matenmanĝo tuj post la 6-a horo estis defio por mi. Kiel germano mi dum jardekoj al kutimiĝis al specifa matenmanĝo, kiu jam estis kvazaŭ ritualo. Sed tiu tipa japana matenmanĝo estis tute alispeca afero. Sen priskribi ĉiujn detalojn mi ne nur supervivis ĝin, sed ankaŭ al kutimiĝis. Antaŭe mi ne kapablis imagi, ke mi sukcesu manĝi fiŝaĵon aŭ spican supon jam frumatene. Kiel kredantaj kristanoj ankaŭ ne mankis la matena preĝo kaj interŝanĝo de diversaj informoj pri tero, faŭno, flaŭro kaj kosmo estis specialaj aldonaĵoj. Ĝis tiam mi ankaŭ ne kutimis kanti okaze de tiu frumatena ceremonio.

Sed la nekutimaĵoj ne ĉesis per la matenmanĝo. Ankaŭ la vespermanĝoj ege diferencis de niaj moroj kaj kutimoj.

Dum la restado ĉe Goro kaj familio menciindas diversaj kulminoj. Tuj la tagon post mia alveno okazis kultura festo en la lernejo de la filo de Goro. Samtempe temis pri la unua japana kulturaĵo, kiun mi povis sperti. I.a. tutlande konata koruso de la lernejo prezentis kaj la kanton, per kiu ĝi gajnis la unuan premion okaze de tutjapana konkurado inter mezlernejoj, sed ankaŭ prezentis tiun kanton, kiun la koruso sekvatage prezentu dum la daŭrigo de la konkurado. Cetere la lernantoj gajnis denove. En la lernejo mi konatiĝis kun aliaj lernmetodoj ol en Germanio. Estis granda ekspozicio pri la atingoj de la lernantoj en la diversaj studfakoj de la lernejo. Ankaŭ ni povis



ĝui etajn teatraĵojn de la lernantoj. Dank' al bildoj kaj kelkaj klarigoj mi ankaŭ eksciis, pri kio temis.

Speciala travivaĵo ankaŭ estis la alproksimiĝinta kaj okazinta taifuno. Pro tiu timiga veterfenomeno la planita ekskurso al la proksima montaro fakte dronis en la forta pluvado. Por tamen ne nur sidi en la domo ni komune elektis celon, kiu plaĉis al la familianoj same kiel al mi. Temis pri vizito en unu el sep diversaj akvarioj de Tokio. Jam la vojaĝo per sur- kaj subtera fervojoj estis interesa afero. En la akvario mem estis multaj interesaj specioj de fiŝoj kaj aliaj enakvaj estaĵoj. Delfenoj kaj fokoj demonstris diversajn artaĵojn kaj la nutrado de diversaj fiŝoj en kaj ekster la akvo estis interesaj momentoj. I.a. ni vidis globfiŝojn, kiujn ni aĉetis pasinttage kiel fileon.

Lunde la 30-an de oktobro mi devis pruvi, ĉu mi memstare povas atingi laŭplanajn celojn. Mi sukcesis atingi la templaron de Asakusa kaj ankaŭ la ĝis nun plej altan televidturon de la mondo, nome la tielnomatan "Ĉielan Arbon", kiu havas altecon de 634 metroj. De tiu turo mi povis ĝui vastan rigardon super la urbo de Tokio. Bedaŭrinde la grandan monton Fuji mi nur sukcesis vidi fantome.

Marde matene mi havis renkontiĝon de la Esperanto-grupo de Maĉida, al kiu i.a. ankaŭ apartenas la du afablaj sinjorinoj, kiuj akceptis min en la flughaveno. Temis pri tre familia evento en publika domo, kiun povas uzi la grupo regule. Trinkante verdan teon kaj manĝante de membrino membakitan kukon okazis diversaj intervjuoj. Pluraj membroj ankaŭ intencis partopreni la Japanan Esperanto-Kongreson kaj tie ili kantis en koruso du kantojn. Tiujn ni ekzercis dum tiu ĉi kunveno. Ne mankis la komuna foto antaŭ la domo. Post la renkontiĝo ĉiuj disiĝis kontente. Mi mem vojaĝis en la centron de Tokio, kie mi hazarde partoprenis gviditan promenadon tra la imperiestra palaca tereno kaj post tiu mi promenis tra la publika orienta imperiestra ĝardeno. Ambaŭ lokoj estis sufiĉe bone frekventataj kaj interesaj. Ĉar jam malheligis, mi post la

vizito de du Ŝinto-sanktejoj rapide deziris vojaĝi al la domo de mia amiko. Sed surrela akcidento malhelpis severe. Mi nur tre malfrue atingis mian tranoktejon.

La 1-an de novembro mi elektis kiel ekskursan tagon al la iama ĉefurbo de Japanio – Kioto. Samtempe mi volis uzi la mondfaman rapidvagonaron Ŝinkansen por iri tien. Frua ellitiĝo helpis plenumi tiujn dezirojn. Unue mi devis vojaĝi per trajnoj al la stacidomo Ŝin-Jokohamo por envagoniĝi. Ĉar mi mendis sidlokon antaŭe, mi trankvile sidiĝis. Post atentigo de afabla najbarino mi eĉ iomete vidis la grandan monton Fuji.

La unua impresio estis, ke la urbo Kioto havas grandegan stacidomon. De tie ankaŭ ekvojaĝas aŭtobuso por ekkoni la urbon. Dum unu horo mi jam vidis la plej grandan parton de la vidindaĵoj. Post la elbusiĝo mi iomete sekvis tiun rondvojaĝon, sed inverse. Vizitindis diversaj grandaj kaj malgrandaj temploj, grandega japana tombejo kaj strateto plena de vendejoj por memoraĵoj kaj manĝaĵoj. Tre volonte mi estus vidinta pli multe, sed la trajno por la revojaĝo jam estis rezervita. Post interesa vespermanĝo en Maĉida mi malfrue alvenis en la domo de mia amiko Goro.

La programo por la jaŭdo estis iomete tempe limigita, ĉar ni komune intencis viziti posttagmeze la Japanan Esperanto-Instituton kaj la novan Esperanto-kafejon.

Mia propra unua programero tiutaga estis la vizito de la plej granda fiŝbazono tutmonde (Tsukiji). Tiu vizito samtempe estis grava kulmino de mia vojaĝo. Ververe temis pri impona vendejaro, sed ne nur de fiŝoj, sed ankaŭ de legomoj, fruktoj kaj eĉ de specialaj memoraĵoj. Mi gustumis grandajn verdajn vinberojn kaj ostron. Mi miris pri la interesaj veturiloj inter la vendejoj, kiuj fronte surhavis kvazaŭbarelan stirilon. Kiam mi finfine sukcesis foti ekzempleron, alvenis grupo de junaj virinoj, kiuj vizitis Tokion okaze de iu internacia konkurso. Tiumomente la stratetoj estis plenŝtopitaj de homoj. Fine mi sukcesis eskapi por viziti tre belan ĝardenon, kiu nomiĝas



En mezlernejo de Maĉida



Partoprenantinoj de konkurso en la Tsukiji-fiŝbazaro en Tokio

Hamarikju. Temas pri artefarita insulo kun multaj lagetoj. La akvonivelon de tiuj oni povas reguligi per speciala kluzo. Tiuj, kiuj ŝatus surgrimpi la Fuji-monton, jam povas ekzerci ĉi tie. Vere ĉerande de la ĝardenaro ekzistas monteto, kiu nomiĝas Fujimijama. La centran tesalonon mi ne sukcesis eniri pro alveninta grupo de lernantoj. Pro tio mi serĉis la elirejon, preteririnte la jam menciitan kluzon, Ŝinto-sanktejon kaj 300-jaraĝan pinon.

Piede mi marŝis laŭ la havenaj konstruaĵoj al la eble plej granda vidindaĵo de Tokio, la Ĉielarka Ponto. Ankaŭ kiel piediranto aŭ biciklanto eblas uzi tiun pontegon. De tie oni havas bonegan rigardon al la haveno kaj al la centro de Tokio de la norda flanko de la ponto kaj al iama fortikaĵo, insulo kaj aliaj havenaj instalaĵoj de la suda flanko. Laŭ turisma gvidlibro oni eĉ de tie vidu la Fuji-monton, sed la videblecoj dum tiu tago ne sufiĉis. Ĉar mi rimarkis, ke eĉ la metroo uzas la ponton, mi reatinginte la kapon de la ponto, intencis vojaĝi per ĝi trans la ponton al la sekvonta stacio. Estis interesa aldonita aventuro.

Post tiu neatendita vojaĝeto mi ankaŭ devis iri en la distrikton Waseda por renkonti Goron, kun kiu mi iris al la tiutaga kulmino. Temis pri vizito de la Japana Esperanto-Instituto. Tie ni estis akceptataj afable kaj bonkore. La dungitoj de la instituto interparolis kun ni amikece, kvankam la preparoj de la proksima kongreso certe premis. Ni ankaŭ uzis la restadon en la domo por viziti la klasĉambron, en kiu ĉiespere okazu kurso, kaj la ampleksan bibliotekon. Post adiaŭo Goro kaj mi iris al la Esperanto-kafejo SOJO por vespermanĝi. Tie ni renkontis vojaĝeman svedon kaj alian japanan junulon. En tiu kafejo oni ne nur parolas Esperanton, sed ankaŭ ofertas nur veganajn manĝaĵojn. Tamen la vespermanĝo bongustis. Ni ankaŭ elektis la manĝaĵon “Hodiaŭa menuo” por esti certaj, ke ni ne ricevus hieraŭan.

Post atingita satiĝo ni iris al lernejo, kie okazadas Esperanto-kurso de Goro. Ĉi-foje nur alvenis du sinjorinoj. Ni parolis pri diversaj temoj. Fine ambaŭ prezentis laboraĵojn pri laboro kaj hobbio. Temis pri familia atmosfera. Post la fino de la leciono ni vojaĝis hejmen.

Sekvis la lasta nokto de mi en la domo de Goro. Post la japana matenmanĝo restis sufiĉe da tempo por prepari la valizon kaj min por la kongreso en Jokohamo.

## La 104-a Japana Esperanto-Kongreso 2017-11-03/05 en Jokohamo

La kongresa temo estis “Haveno peras, Esperanto peras”. Per la trajno ni alvenis al Jokohamo kaj tuj iris en la kongresejon. Ni aliĝis kaj mi eksciis, ke mi ne havas tranoktejon. Tio memkompreneble maltrankviligis min sufiĉe, sed finfine la LKK trovis hotelan ĉambron por mi. Ĝi eĉ troviĝis en piedira distanco de la kongresejo.

Inter la diversaj prihotelaj informoj mi ĝuis la malfermajn programerojn de la kongreso. Ne mankis la komuna kantado de la “Himno”. Sekvis diversaj salutvortoj, honorigoj kaj ankaŭ komuna foto ne mankis. Okazis la baza prelego de mia amiko Goro kun la temo “Kion Esperanto povas proponi al la nuna mondo”. Dua prelego de Dieter Kleemann el Durmersheim, Germanio, temis pri “Haveno peras – Esperanto peras”. Li aldonis duan parton, en kiu li parolis pri la nuntempa situacio en Eŭropo, rilate al alvenintaj kaj alvenontaj rifuĝintoj el aliaj landoj.

Fina kulmino de tiu vendredo estis la “Arta Vespero”. La Yuka Bossa Blend Band, la Yokohama Sisters kaj la sopranistino Sindou Masako kantis kaj en Esperanto, en la japana, kaj en aliaj lingvoj diversajn, bone konatajn kaj malpli konatajn kantojn. Ĉiuj ricevis grandan aplaudon.



Post la prezentado eblis komunaj fotoj kun la artistoj. Dum la sabato (2017-11-04) ofte malfacilis elekti inter la diversaj programeroj. La plej multaj estis en la japana lingvo. Tio iomete malpligrandigis la nombron de elekteblaĵoj. Mia petita kontribuo kune kun Robert Kaminski el Pollando estis gvidi konversacian kurseton. Tiun partoprenis sep homoj el diversaj landoj. Inter diversaj programeroj eblis viziti la libroservon, kiu prezentis amase librojn, sed ankaŭ aliajn varbilojn kaj sciindaĵojn. I.a. oni jam informis pri la sekvonta kongreso en Nara. Malmulte da tempo mi nur sukcesis investi por interesa aparta ekspozicio pri lernolibroj de Esperanto kaj historiaj afiŝoj.

Interesa programero, kiun mi partoprenis, nomiĝis "Hamalogio". Temis pri aferoj de kaj pri Jokohamo. Okazis kontribuajtoj pri akvo el la vilaĝo Dooŝi, kiu nomiĝas "Akvo de Jokohamo" kaj Suzuki Keiĉiro, kiu estras la Japanan Esperanto-Instituton, prezentis metiajn bierojn de Jokohamo. De ambaŭ trinkaĵoj la aŭskultantoj rajtis gustumi. Ekzemple temis pri kvin diversaj bieraj specoj. Aliaj programeroj i.a. temis pri Goo-ludo, komputilado, vojaĝado, lernado. Ankaŭ okazis diversgradaj ekzameniĝoj, spektelblis diversaj filmoj kaj okazis fakkunsidoj, ekz. de Oomoto kaj ILEI.

Unu el la grandaj kulminoj estas la komuna bankedo, kiun ĉeestis granda nombro de la partoprenantoj. Tiu programero okazis en ĉina restoracio en la ĉina kvartalo de Jokohamo, cetere en la plej granda ĉina komunumo de Japanio. Sed oni ne nur ĝuis la frandaĵojn, sed ankaŭ diversajn kontribuajtojn. Ekz. ĉiu eksterlandano devis paroli kelkajn salutvortojn. Mi mem estis la unua kaj transdonis la salutojn de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Ligo Berlin. Ankaŭ mi transdonis salutojn de Germana Esperanto-Asocio.

Ĉiuj parolintoj deziris al la kongreso kaj al la organizintoj plenan sukceson. Sekvis la invito al la sekvonta kongreso en Nara kaj pupteatraĵo. Entute tio estis tre amuza kaj interesa vespero. Eble ni povos transpreni iun aŭ alian ideon al la germanaj eventoj.

La dimanĉo (2017-11-05) samtempe estis la lasta tago de la kongreso kaj mia lasta tago en Jokohamo. Mi uzis la eblon denove iri alian vojon al la kongresejo kaj ekvidis belan parkon apud la granda basbala stadiono de Jokohamo. Krom tio mi iris tra la ĉina kvartalo.

Mi tuj elektis el la programo serion de mallongaj filmoj, kiujn sendis ĉefe japanoj al la Japana Esperanto-Instituto por eventuale gajni premion. Tio tre similis al la konkurado en Germanio. Mi eĉ rekonis filmeton. Post tiu mi elektis prelegon de mia multjara filipina amiko Albert Stalin

Garrido, kiu prezentis sian hejminularon, kvazaŭ ĉiĉerono, vizitante diversajn vidindajn urbojn kaj pejzaĝojn. Sekvis vigla diskutrondo. Post la tagmanĝo el "skatolo" sekvis la lasta parto de la 104-a Japana Esperanto-Kongreso. Robert Kaminski prezentis sian prelegon pri "Zamenhof en Varsovio". Li detale raportis pri la familianoj, iliaj vivkondiĉoj kaj pri la sortoj de ili. Sekvis kantado, resumado pri la kongreso kaj la transdono de la kongresa flago al la LKK de Nara, kie okazis la 105-a kongreso, ĉi-foje kiel komuna kongreso de Suda Koreio kaj Japanio.

Al la 104-a Japana Esperanto-Kongreso aliĝis 459 kaj reale partoprenis 331 Esperanto-parolantoj kaj -amikoj. Inter ili partoprenis laŭ la oficiala statistiko 23 esperantistoj el 11 aliaj landoj: Suda Koreio - 7, Germanio - 4, Ĉinio - 2, Aŭstrio - 2, Francio - 1, Vjetnamio - 1, Filipinoj - 1, Pollando - 1, Hungario - 1, Svedio - 1 kaj Anglio - 2. Entute temis pri tre varia, interesa kaj bela kongreso kaj mi ĝojas, ke mi sukcesis ĉeesti.

Dum multaj partoprenintoj prepariĝis al la dimanĉa fina ekskurso, mi iris en mian hotelon, kie atendis min mia valizo. Je la 18-a horo mi bonŝance atingis mian hotelon en Tokio Nihonbaŝi, proksime al la granda rivero Sumida, serĉis vespermanĝon kaj kontente ekdormis.

Kiam mi lunde venis al la ĝiĉeto pro mia flugbileto la afabla s-ino deklaris al mi, ke mi ne flugu per la planita aviadilo, sed prenu pli malfruan, eĉ laŭ alia vojo. Mi ne longtempe cerbumis, ĉar ili ofertis pli altan pasaĝeran kategorion je la sama prezo. Estis tute alia flugvojaĝo, tion mi precipe konstatis, kiam mi ŝanĝis la aviadilon en Frankfurto ĉe Majno por flugi pluen al Berlino. En Berlino atendis mia filo, kiu ŝoforis min al mia aŭtomobilo, ke mi bonorde atingu mian hejmon.

Ĉu ne temis pri granda aventuro? Ĝenerale Japanio tre vizitindas, sed per Esperanto la restado tie fariĝis pli interesa kaj intensa.

**Ronald Schindler,**  
Frankfurt (Oder), Germanio



Internacia tablo dum la granda bufedo  
dum la 104-a japana Esperanto-Kongreso



## 34. Internationale Frühlingswoche in Plauen (34. PSI) 30. März - 6. April 2018

Sich fühlen wie ein/e Feuerwehrmann/frau - von vielen Feuerwehrutensilien und –gerätschaften umgeben, in einer richtigen alten Feuerwache, mit der Möglichkeit, sogar die alte Rutschstange zu benutzen und beim Kostümball Originalausrüstung tragen zu können?

**B**ei der diesjährigen PSI-Veranstaltung des Deutschen Esperanto-Bundes trafen sich über 100 Teilnehmer aus 10 Ländern in der Jugendherberge der Stadt Plauen, die in der alten Feuerwache im Stadtzentrum untergebracht ist.

Traditionell bietet das PSI-Programm Esperanto-Kurse (für Kinder, Anfänger und Fortgeschrittene), Vorlesungen (zu den verschiedensten Themen), Sport-, Musik- und Tanzübungen und unterschiedliche Handarbeits- und Bastelgruppen. Diese Angebote gibt es während der folgenden Zeiten: morgens vor dem Frühstück 30 Minuten, vormittags zweimal 90 Minuten und nach dem Abendessen vor dem Abendprogramm 60 Minuten. Der Nachmittag ist für Ausflüge (meist 2 Angebote pro Tag) vorgesehen, parallel findet das Jugendprogramm statt. Am Abend gibt es eine Kulturveranstaltung, danach wird ein Film mit Esperanto-Untertiteln in einem kleinen Kino vorgeführt.

Besonders spannend in Plauen war eine Nachtführung, die die erste Demonstration gegen das DDR-Staatsregime



am 7. Oktober 1989, vor der das Regime kapitulieren musste, zum Thema hatte. Ca. 15.000 Teilnehmer konnten damals erreichen, einen Dialog mit der Stadtverwaltung einzuleiten (Runder Tisch). Der damals bei der Demonstration nicht eingesetzte Wasserwerfer konnte in der alten Feuerwache im Rahmen einer kleinen Ausstellung zum Thema im Original besichtigt werden.

In der Umgebung von Plauen gibt es die zwei größten Eisenbahn-Ziegelsteinbrücken der Welt – die Elstertalbrücke konnte im Rahmen einer Wanderung begangen und mit dem Zug befahren werden. In Plauen selbst standen Besuche des Erich-Ohser-Museums (E. O. Plauen, Karikaturist, „Vater und Sohn“) und der Schau-Stickerei zur Auswahl. Der weiteste Ausflug führte nach Zwickau in das Audi- bzw. Horch-Museum – dort geht es um die Geschichte der Entwicklung und der Produktion von Automobilen in der Region (in der übrigens auch der Trabbi produziert wurde).

Abends fand u. a. ein Kostümball statt (natürlich unter dem Motto Feuerwehr), es gab tolle Konzerte von Ĵele (Elena Wilke aus Schwedt und Ĵenja aus Bremen mit Unterstützung von Geomar aus Kuba) und Kaŝi (Carsten Schnathorst aus Hamburg) sowie eine „Magische Reise um die Welt“ der Zauberbühne von Christoph Frank. Außerdem gab es noch ein Osterfeuer, einen Quizabend und den traditionellen internationalen Abend mit Beiträgen der Teilnehmer. Für den gesamten Abend stand immer eine Kneipe zur Verfügung – dort wurde gespielt, getrunken und natürlich sehr viel Esperanto gesprochen.

Kurzum: alles in allem wieder eine sehr gelungene Veranstaltung, die das PSI-Team organisiert hat – für das 35. PSI in der Jugendherberge Hochspeyer 2019 haben wir uns bereits angemeldet.

**Stefan Kriehoff & Brigitte Kranz**



# 34-a Printempa Semajno Internacia en Plauen (34-a PSI)

30-a de marto – 6-a de aprilo 2018

**Senti sin kiel fajrobrigadist/in/o – ĉirkaŭata de multaj uzajoj kaj ilaro de fajrobrigado, en reala malnova fajrobrigada domo, kun la ebloj eĉ uzi la malnovan glitstangon kaj eĉ porti fajroestingan ekipaĵon dum la kostuma balo?**

**D**um la ĉi-jara PSI-aranĝo de Germana Esperanto-Asocio renkontiĝis pli ol 100 partoprenantoj el dek landoj en la junulargastejo de la urbo Plauen, kiu situas en la malnova domo de la fajrobrigado en la centro de Plauen.

Tradicie la PSI-programo ofertas Esperanto-kursojn (por infanoj, komencantoj kaj progresintoj), prelegojn (pri diversaj temoj), sport-, muzik- kaj dancekzercadojn kaj diversajn manlaborgrupojn. Tiuj ofertoj okazas dum jenaj tempaj blokoj: matene antaŭ la matenmanĝo 30 minutojn, antaŭtagmeze dufoje 90 minutojn kaj post la vespermanĝo antaŭ la vespera programo 60 minutojn. La posttagmezo estas destinita por ekskursoj (plej ofte du ofertoj ĉiutage), paralele okazas la junulara programo. Vespere okazas kulturaranĝo, poste filmo kun Esperantaj subtitoloj estas montrata en malgranda kinejo.

Aparte interesa en Plauen estis nokta gvidado, kiu havis kiel temon la unuan manifestacion kontraŭ la



GDR-reĝimo la 7an de oktobro 1989, pro kiu la reĝimo devis kapitulaci. Proksimume 15.000 partoprenantoj povis atingi, ke dialogo kun la urba administrantaro komenciĝis (ronda tablo). La originala, tiam ne uzata fajrobrigada veturilo kun akvokanono staras en apuda domo de la malnova fajrobrigado, enkadre de malgranda ekspozicio pri tiu manifestacio de 1989.

En la ĉirkaŭaĵo de Plauen situas la du plej grandaj fervojaj brikpontoj de la mondo – la tiel nomata Elster-valponto (Elstertalbrücke), kiun eblis piede esplori dum migrado kaj poste trajne transveturi. En Plauen mem oni povis viziti la Erich-Ohser-muzeon (E. O. Plauen, karikaturisto, “Patro kaj filo”) kaj muzeon, en kiu oni montras iamajn teknikojn de brodado. La plej malproksima celo estis la Audi- kaj Horch-muzeo in Zwickau – ĝi temas pri la historio de la evoluo kaj produktado de aŭtoj en la regiono (en kiu, cetere, ankaŭ la “Trabbi” estis produktata).

Vespere okazis kostuma balo (kompreneble sub la moto fajrobrigado), estis belegaj koncertoj de Ĵele (Elena Wilke el Schwedt kaj Ĵenja el Bremen kun subteno de Geomar el Kubo) kaj Kaŝi (Carsten Schnathorst el Hamburg), krome “Magia vojaĝo tra la mondo” de Zauberbühne de Christoph Frank. Oni ankaŭ povis ĝui paskan fajron, kvizovesperon kaj la tradician internacian vesperon kun kontribuoj de la partoprenantoj. Dum la tuta vespero ĉiam estis trinkejo disponebla – tie oni multe ludis, trinkis kaj multe babilis, kompreneble ĉefe en Esperanto.

Resume: entute denove tre sukcesa evento, kiun la PSI-teamo organizis – al la 35-a PSI en la junulargastejo en Hochspeyer 2019 ni jam aliĝis.

**Stefan Krieghoff  
kaj Brigitte Kranz**



## Bibliaj Tagoj en 2018 kaj 2019

Ankaŭ en 2018 okazis la Bibliaj Tagoj, kiujn organizadas la Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio (ELKG), landa sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia, kune kun laborgrupo de Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo en Germanujo.

**D**e la 6-a ĝis la 11-a de marto renkontiĝis 28 kristanoj el sep landoj en la luksa junulargastejo de Mainz..

Kvankam la ĉeestantoj apartenis al diversaj konfesioj, oni en ekzemplodona ekumena spirito traktis la temon “Virinoj en la biblio”, kantis kaj preĝis komune el la konata libro Adoru kaj je la fino eĉ festis “ekumanan diservon en formo de katolika meso” komprenante la vorton “katolika” laŭ ties origina signifo kiel “universala”. Tra la programo, al kiu kontribuis pluraj partoprenantoj, gvidis pastro Albrecht Kronenberger, dum Stefan Lepping majstre akompanis la kantadon per piano. Ekster tiu edifa parto Ulrich Matthias gvidis posttagmeze tra la urbo kun katedralo kaj pluraj famaj muzeoj. Vespere lia edzino Nan Matthias-Wang instigis al membromova gimnastiko Ĉi-gong. Cetero restis multa tempo por interbabili en Esperanta etoso.

Zorgojn kaŭzas la kreskanta aĝo de la membroj. La malmultaj aktivuloj iom post iom pro malsaneco devas retiriĝi. Urĝe necesus, trovi katolikan sacerdoton kiel posteulon por Albrecht Kronenberger; ankaŭ Hedwig Fischer anoncis, venontjare transdoni sian postenon kiel vicprezidanto de ELKG. La membrokunveno en Mainz ankoraŭ ne trovis solvon. Necesus ankaŭ konstanta komisiito por organizi la venontjarajn Bibliajn



Tagojn. Provizore Rudolf Fischer faris tion ĉi-jare. Kiel kompromiso montriĝis, venontjare simple rekonveni en la sama loko, ĉar la junulargastejo trovis vastan aplaŭdon.

Fakte intertempe la nova kontrakto estas subskribita: La Bibliaj Tagoj 2019 do denove okazos en Mainz, de la 27a de februaro ĝis la 3a de marto 2019, eĉ sen kresko de la partoprenkotizoj. Detalojn kaj aliĝilon oni povas jam trovi en la Interreto ĉe [www.esperanto.de/keli](http://www.esperanto.de/keli). Aliĝu jam nun al la komisiito per [Rudolf.Fischer@esperanto.de](mailto:Rudolf.Fischer@esperanto.de)

## Esperanto auf dem 101. Katholikentag in Münster

Schon vor über einem Jahr begannen die Vorbereitungen der örtlichen Esperantofreunde für die Teilnahme am 101. Katholikentag, vom 10. bis 13. Mai 2018 in Münster/Westf.

**W**ichtig war, dass es einen katholischen Esperanto-Fachverband gibt, dessen Repräsentant in Deutschland, nämlich Rudolf Fischer, zur Ortsgruppe Münster gehört und somit selbst die Anmeldung in die Hand nehmen konnte. Vorgesehen war ein Informationsstand auf der sog. Kirchenmeile, darüber hinaus wurde diesmal auch ein Beitrag zum offiziellen Programm vorgeschlagen, nämlich ein Vortrag “Esperanto – Frieden braucht Verständigung”. Damit war der Zusammenhang mit dem Thema des Katholikentags, “Suche Frieden”,





offenbar, und tatsächlich kam ein paar Wochen später die Nachricht, dass der Programmpunkt angenommen war, aber als Werkstatt "Wir erarbeiten eine gemeinsame Sprache".

Der kleinste Informationsstand kostete mit 3 m x 3 m schon fast 600 €, ohne jegliche Ausstattung. Dazu trug der Deutsche Esperanto-Bund (D.E.B.) mit 200 € bei, weitere 200 € kamen von einem großzügigen Spender, den Rest trägt die Familie-Fischer-Stiftung. Dafür gab es 7 Freikarten für die Standhelfer: Guido Brandenburg, Rudolf Fischer, Gerdt Wienema, Martin Brüggemeier, Petra Dückershoff, Snaige Malych aus Litauen und Helmut Klünder. Die Zusammenarbeit klappte sehr gut, jeder trug nach seinen Talenten bei. Im Vorfeld hatte Barbara Brandenburg (D.E.B.-Vorstand) geholfen, das überarbeitete Faltblatt "Esperanto in den Kirchen" neu herauszugeben. Vom Kirchentag 2013 in Hamburg kam die Idee, ein Werberollo mit der Esperanto-Grammatik einzusetzen, aber das Original war nicht aufzufinden. So wurde eine neue Vorlage (wieder mit Hilfe von Barbara Brandenburg) erstellt, und pünktlich zum Katholikentag konnte dieser Blickfang eingesetzt werden.

Die Helfer hatten sich das ehrgeizige Ziel gesetzt, an den ersten beiden Tagen der Kirchenmeile 220 postkartengroße Einladungen zum o.g. Programmbeitrag zu verteilen, um am Samstag einen vollen Saal zu haben. Dieses Ziel wurde erreicht, obwohl es am ersten Tag ziemlich viel regnete. Der Informationsstand war leider etwas abgelegen, dennoch kamen tausende von Besuchern vorbei, und viele ließen sich ansprechen, darunter erstaunlich viele junge Leute. Leider hatten die Münsteraner Esperantofreunde nichts von der Deutschen Esperanto-Jugend gehört, die künftig auf jeden Fall unter den Standhelfern vertreten sein sollte. Oberstes Ziel war zu informieren, denn selten wird sich jemand auf der Stelle entscheiden, Esperanto lernen zu wollen. Das gab es aber auch, und so konnte sich, wer wollte, in eine Liste eintragen. Sie enthielt am Ende immerhin 13 Interessenten an einem Kurs in Münster sowie 3 Bitten um Kontaktadressen.

Insgesamt kam es zu hunderten von Kontakten, darunter viele längere Gespräche. Dazu durfte man sich aber nicht in das Infozelt zurückziehen, sondern musste schon die Vorüberziehenden höflich auf sich aufmerksam machen, am besten mit der Esperantoversion hinter der Ansprache auf Deutsch. Neben Jugendlichen war die interessanteste Altersgruppe die um die 50, die nach neuen Themen und Kontakten für ihre zweite Lebenshälfte Ausschau hielten. Besondere Fachgespräche gab es mit Philologen, von denen so mancher seine Meinung zu Esperanto revidieren musste. Der Gewinn für unsere Sache war hauptsächlich die Erkenntnis "Esperanto funktioniert, gibt es noch und wird gesprochen." Denn Leuten, die auf Geld, Karriere und Ansehen aus sind, hat Esperanto auf absehbare Zeit nichts zu bieten. Nur relativ wenigen kann man verdeutlichen, welchen Gewinn ihnen Esperanto geben



**Snaige Malych, Rudolf Fischer vor dem Infozelt, rechts informiert Helmut Klünder einige Jugendliche. Beide Bilder machte Hedwig Fischer.**

kann: durch die gemeinsame Sprache eine Ahnung von der Idee "Wir sind eine Menschheit" und als Christen darüber hinaus "Wir sind alle Kinder Gottes" im Kreise Gleichgesinnter zu erleben. Gerade bei Veranstaltungen wie dieser mit vielen selbstbewussten und alternativen Menschen fand das bei einigen Anklang.

So kam der mit Spannung erwartete Samstag mit der Werkstatt, zu der wir auch gemeinsames Singen von Kirchenliedern auf Esperanto angekündigt hatten. Deshalb war Stefan Lepping, bekannt von den Esperanto-Bibeltagen, eingeladen, mit seiner Gitarre die Lieder zu begleiten. Tatsächlich wurde der Seminarraum der Universität (trotz hoher Eintrittspreise) mit gut 35 Zuhörern nahezu voll besetzt. Ein kleiner Zeitungsartikel in Nordwalde hatte auch noch einige Zuhörer angelockt, darunter die Pfarrsekretärin, die sich am Ende in die Liste der Kursinteressenten eintrug.

Hedwig Fischer sprach die Einleitung, dass Frieden Verständigung erfordert und zwar nach einem gerechten Modell. Danach führte Rudolf Fischer ins Esperanto ein, als bestem Kompromiss zwischen den teils gegenläufigen Anforderungen der Kriterien für eine "gerechte" Sprache. Es kamen erstaunlich viele sachkundige Fragen aus der Zuhörerschaft, die sehr gut mitging. Die Lieder brachten die gewünschte Auflockerung, und am Ende gab es lautstarken Applaus.

Trotz mancher Mühe beim Auf- und Abbau waren die münsterschen Esperantofreunde am Ende sehr zufrieden. Der nächste Evangelische Kirchentag ist 2019 in Dortmund, wo sich die Münsteraner mit einbringen können. Dann folgt der Ökumenische Kirchentag 2021 in Frankfurt am Main. Esperanto sollte auch dort wieder sichtbar und hörbar sein.

**Rudolf Fischer**



# Esperanto-tendumado en Herzberg



**Fine de marto la Domeyer-parko en Herzberg iĝis tendumejo por grupo de Herzberganoj, kiuj gastigis Verdajn Skoltojn el Belgio, Francio, Hispanio kaj Kanado.**

## Esperanto-tendumado en la Domeyer-parko en Herzberg

Fine de marto, ekzakte merkredo la 28-an, la Domeyer-parko en Herzberg iĝis tendumejo por grupo de kvin Herzberganoj, kiuj gastigis Verdajn Skoltojn el Belgio, Francio, Hispanio kaj Kanado.

Ĝi hundo ĉeestis nian tendumadon. Dum la unuaj tagoj venis Zsófia Kóródy kaj Cornelia Luszczyk de la Esperanto-centro, por instrui Esperanton al la loka skoltgrupo. Ankaŭ ni uzis la tempon por prepari ludojn, kolekti rubaĵojn en la ĉirkaŭaĵo kaj plani la manĝojn por la venonta tendumado. Jam semajnoj antaŭe estis planitaj diversaj ludoj kaj aktivajoj por niaj gastoj.

En sabato posttagmeze ili alvenis sepope kaj tuj ni interkonatiĝis, farante sukerpufaĵojn ĉe la fajro. Ĉiuj jam antaŭpreparis siajn dormlokojn en la granda blanka tendo kaj poste vespermanĝis ĉe kradrostilo. Noktiĝis kaj ni sidis ĉirkaŭ la fajro, dum la skoltoj rakontis legendojn el siaj hejmurboj. Relative frue ni endormisakiĝis, ĉar por kelkaj skoltoj la paska dimanĉo komenciĝis per sankta meso en la katolika preĝejo de la sankta Jozefo je la 6-a matene. Je la 8-a la resto de la grupo aliĝis al la komuna matenmanĝo. Fortigitaj por la tago la grupo ekis al la akvofalo por serĉi malfacile troveblajn ovojn. Surprize Delfeno malkovris la kaŝlokon de tre malnova taglibro, kiu skribiĝis de kunfondinto de la urbo en la 14-a jarcento. En ĝi estis multaj solvendaj enigmoj. Ni eksciis, ke origine la kastelo de la urbo estis planita en alia loko, ol ĝi hodiaŭ troviĝas. Sed nia verkisto ne konsentis kun la loko. Mistera virino montris al li la eblecon trovi sep magiajn bulojn, por verigi unu deziron lian. Kaj ni komprenis, ke ni sekvu liajn paŝojn. La unua stacio estu Scharzfeld, kien ni piediris dum tri horoj, trovis la unuan



bulon survoje kaj devis gajni la duan, venkante ŝakludon kontraŭ bulo-gardisto en la ŝtona preĝejo. La vesperon ni pasigis ĉe paska fajro en la sama loko kaj en mallumo marŝis reen, tenante torĉojn en niaj manoj. Ankoraŭ en tiu nokto okazis totemigo de du Verdaj Skoltoj, kiuj nun nomiĝas Abelo kaj Garano. La paskan ludon ni uzis por konstrui benkojn el po du paledoj kaj plu serĉi bulojn. Dum urba ludo ni vizitis kelkajn Esperantajn vidindaĵojn, same kiel la urbocentron, la kastelon kaj ludis en diversaj lokoj. Tri buloj troviĝis, kaj tion ni festis aŭskultante muzikon en la vespero. Ankaŭ la sekva tago estis plena de okazaĵoj. La urbestro vizitis nin dum la matenmanĝo kaj ni batalis kontraŭ fantomoj de arbareto por savi de tie la sesan bulon. Sed malbena perdis ĝin denove. Same okazis poste en naĝejo, kie bulo helpe de trezormapo troviĝis kaj post sangopostula batalo denove perdiĝis. Tamen ni sukcesis verigi la duan parton de la deziro de la kunfondinto, kiu por unu vespero aperigis grandan saltkastelon en la parko. Ĉiuj freneze saltis ĝis mallumo kaj pluveto forigis ĝin, ankaŭ ĉar dume en la historio de la urbo la kastelo konstruiĝis sur monteto. Ankoraŭ dum du tagoj ni kune ĝuis nian libertempon, eĉ kiam la germanaj lernantoj jam devis iri al lernejo. En jaŭdo la adiaŭa horo venis kaj ĉiuj esperante je baldaŭa rekunven' reveturis hejmen. Por mi estis granda plezuro organizi tiun tendumadon kun diversaj partneroj kaj vidi la lokajn skoltojn klopodi paroli en Esperanto kaj sperti la ĝuon, kiun havis la junuloj plenumante la grandegan taskon solvi ĉiujn enigmojn kaj pasigi tempon kune ĉefe ekstere. **Michaela Stegmaier**





## KEKSO – La Kreema Esperanto-Kurso

**De la 18-a ĝis la 21-a de majo, okazis en la urbeto Dupontoj (germane: Zweibrücken), kiu ne tro foras de la german-franca landlimo, modesta kaj ĉarma kunveno de esperantemaj junuloj: La Kreema Esperanto-Kurso, KEKSO!**

**P**rofitis ni de la samtempe kaj samloke okazanta Trilanda Kongreso de Germanio, Francio kaj Luksemburgio. Ni povis uzi apartan ĉambron de la kongresejo kaj ankaŭ kuirejton, por memzorge fari nian propran, pli junularcelan esperantumadon.

Alvenis specife por KEKSO dek kaj iom da junaj homoj, venintaj de diversaj partoj de Germanio. Kompreneble en aro de preskaŭ nur denaskaj germanlingvanoj, kun sufiĉe da komencantoj, estas malfacile ĉiam teni la “disciplinon” ne krokodili. Tio estis eta manko; eble estintus alie, se ankaŭ kelkaj el niaj junaj samideanoj el Francio decidintus veni, por igi la grupon pli miksa kaj internacia. Ĉiuokaze tamen mi pensas, ke la formato de KEKSO estas tre taŭga por ekallogi freŝajn esperantemulojn, ankoraŭ ne tiom spertajn en la lingvo.

La kuran tempon ni pasigis per diversaj, plejparte spontane planitaj kaj realigitaj aktivaĵoj, kiel promenado tra la apudurba arbaro kaj montetaro. Ni promenis eĉ tioman distancon, ke ni ŝanĝis de unu federacia lando de Germanio al alia! (Se vi tamen prenos mapon por vidi, kie troviĝas Dupontoj, vi rimarkos, ke tiu atingo ne estas tiom elstara.) Alian tagon parto de nia grupo iris al naĝejo en la urbo, kie ni povis ĝui naĝadon eble iom pli komfortan ol tiu dum Novjaro 2017 ĉe Waldheim am Brahmssee. Viziton al la loka, hazarde tiam okazanta urba popolfesto mi same tre bele memoras.

Danke al la paraleleco de nia aranĝo al la Trilanda Kongreso, ni bonŝancis povi ankaŭ partopreni kelkajn el ties programeroj. Mi memoras ekzemple tre interesajn prelegojn kaj diskutrondojn pri la ebloj de plievoluigo de Esperantujo en la hodiaŭa, digitalema mondo, aŭ pri la kreskanta movado poliglotula. Plie, estis ofertita Esperanto-kurso, celanta komencantojn. Same



Grupfoto de la KEKSO-partoprenantoj. Mankas Frederik kaj Jonas, kiu fotis.

mi tre ĝojis pro abundeco de plej diversaj esperantlingvaj kaj priesperantaj libroj, kadre de la kongresa libroservo.

Tie fakte ekestis ankaŭ amuza situacio, kiam anoj de la regiona televidkanalo venis al la kongresejo por fari – ĉirkaŭ unuminutan – raportajon pri la okazanta Esperanto-kongreso. Oni petis iom el ni junuloj veni al la libroservo-ĉambro por ŝajnigi trafoliumi la librojn tre interesate. Do – ni eĉ eniĝis en televidon, ege famiĝis...

Mi pensas, ke ĉiuj KEKSO-partoprenintoj kunsentus kun mi, se mi diras, ke ni pasigis vere ĉarmajn tri tagojn kune. KEKSO estas bela ekzemplo, ke porjunula renkontiĝo ne bezonas ĉiam esti realigita je la dimensioj de JES aŭ IJK. Sufiĉas ja havi kelkajn malfermajn kaj kreemajn homojn, kiuj ĝojas kunpasigi iom da tagoj kaj vesperoj en verdula kuneco.

Michael Vrazitulis

## Ĉiusemajna demando

**Ekde la mezo de aprilo aperas ĉiusemajne nova demando en nia Facebook-paĝo. Vi povas komenti kaj plusendi por scii kion pensas viaj amikoj pri tio. Jen ekzemplo kaj ebla respondo:**



**L**a Fluganta Spagetmonstro aŭ ankaŭ Spafumo estas la Dio de la religio nomata “flugantspagetmonstrismo” (FSM) aŭ “pastafarismo” (*Flying Spaghetti Monsterism* aŭ *Pastafarianism* angle). Bobby Henderson komencis la flugantspagetmonstrismon interrete kiel religian satiron, ĉar regiona estraro de edukado en Kansaso (usona ŝtato) decidis, ke dum la leciono pri biologio, la teorion de evoluado oni instruu nur kune kun tiu de “inteligenta dezajno” (ID). Pro tio Henderson sendis oficialan leteron al la Kansasa Komitato de Edukado. En la letero li skribis, ke ankaŭ la Fluganta Spagetmonstro devos esti instruata en la lernejo. Li ankaŭ diris, ke lia letero pravas, ke la Fluganta Spagetmonstro estas almenaŭ tiel bona teorio pri la komenco de la universo kiel tiu de inteligenta dezajno.

Esence, la tiel nomataj pruvoj de Henderson paralelas kaj tiel celas moki la argumentojn de la proparolantoj de inteligenta dezajno kaj kreitismo.





## Manfred Retzlaff (1938-2018)

**Forpasis Manfred Retzlaff,  
sed espereble postrestos lia *poezio.net* .**

**K**iel verki nekrologon pri homo, kiun mi neniam renkontis, sed tamen sentas la devon adiaŭi lin de nia mondo?

Jam tiu demando retorika esprimas iumaniere, ke Manfredo ne restis nekonatulo, sed impresis la homojn per sia verkado.

Manfredo Ratislavo, kiel li mem nomis sin kaj lia retejgo *poezio.net* (kun preskaŭ mil pretaj poemoj) restos poreterne en la pensoj kaj memoro de poezi-emuloj. Foton pri li mi ne trovis, sed kio pli bone povus esprimi almenaŭ eron el liaj pensaro kaj kredo, ol 3 strofoj el kanto (Paul Gerhardt, Geh aus, mein Herz), kiun li mem tradukis:

*Eksteren iru, mia kor'  
kaj vidu, kiel la Sinjor'  
vin estas regalinta.  
Rigardu la ĝardenon vi  
kaj vidu, kiel bele ĝi  
sin estas ornaminta.*

*Ho faru, mia kara Di',  
ke funde la spirit' de Vi  
en mi enradikiĝu.  
Kaj faru, ke je Via glori'  
en Via ĝardenego flori'  
por ĉiam mi fariĝu.*

*Elektu min por la ĝarden'  
de l' paradizo kaj de l' ben'  
je mia lasta horo!  
Mi volas servi tie ĉi,  
kaj post la vivo nur al Vi,  
eterne, ho Sinjoro!*

Tion li esperis kaj ja meritis. Mi certas, ke li nun jam ĝuas tiun paradizan pacon!

**Utho Maier**



## Hans-Dieter Platz (1943 -2018)

**La 20-an de aprilo mortis nia amiko Hans-Dieter Platz, konata inter esperantistoj kiel HDP, en aĝo de nur 75 jaroj.**

**L**i estis eklerninta la lingvon kiel lerneĵano en la 60-aj jaroj. Renomon inter esperantistoj li unue akiris kiel Esperanto-vinkulturisto kaj organizanto de renkontiĝoj en lia palatinata hejmvilaĝo St. Martin. Dum jaroj li oficis kiel trezoristo de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Eĉ pli konata tamen li fariĝis kiel fondinto kaj organizanto de la Internacia Festivalo (IF) – ĉiujara jarfina renkontiĝo laŭ la modelo de la tiamaj Internaciaj Seminarioj de GEJ, sed por aĝgrupo iom pli alta. IF-oj sub lia gvido okazis inter 1979 kaj 2015. Similaj renkontiĝoj daŭrigantaj la tradicion en Germanio hodiaŭ estas NoRo kaj Luminesk'. Malpli perfektaj, evidente: HDP ne estas kopiebla.

Ne estas troigo ke HDP – kiu neniam aspiris postenojn en la organizita movado – vivis por Esperanto, eĉ mem fariĝis institucio de nia eta komunumo. Post lia entombigo, kiun ĉeestis grupo da iamaj IF-anoj, ekestis la ideo starigi ion similan kiel la “IF-fonduson”, kiun li kreis kaj utiligis por ebligi la partoprenon ankaŭ al esperantistoj el malpli riĉaj landoj. Ni vivtenos lian memoron!

**Ulrich Brandenburg**






**27.12.2018 – 03.01.2019**  
**Königswinter / Germanio**



LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon – lingvokursojn, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.

**Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la oficejo en Berlin aŭ ĉe**  
**[andreas.diemel@web.de](mailto:andreas.diemel@web.de) kaj [barbara.brandenburg@esperanto.de](mailto:barbara.brandenburg@esperanto.de).**



## Neues Werberollo

**Die Fachgruppen der Christen im Deutschen Esperanto-Bund haben anlässlich des Katholikentages in Münster/Westf ein neues Werberollo erstellen lassen.**

**E**s basiert auf einer älteren Version, wohl von der Deutschen Esperanto-Jugend, ist aber inhaltlich überarbeitet und (mit Hilfe von Barbara Brandenburg) entsprechend modifiziert worden.

Der Preis (samt Tasche) war erstaunlich niedrig (ca. 66 €) einschließlich Versand. Das Werberollo kann bei allen Veranstaltungen als Blickfang eingesetzt werden und stieß beim Katholikentag auf sehr viel Interesse. Natürlich enthält es nicht die "gesamte" Grammatik des Esperanto, sondern vor allem die Formenlehre mit einem kurzen Dialogbeispiel. "Mann, ich versteh ja fast alles!" war die erstaunte Reaktion vieler Neugieriger. Regelmäßigkeit und Sprachökonomie lösten Begeisterung aus.

Wenn Ortsgruppen und andere Fachverbände ein eigenes Exemplar des Werberollos für sich erstellen lassen wollen, können sie sich wegen der pdf-Vorlage an Rudolf Fischer <fischru@uni-muenster.de> wenden. Wenn sich mehrere zusammenschließen, gibt die produzierende Firma auch noch einen Mengenrabatt.



## Ripozi sur Esperanto-benke

Por lia nova pensiulo-vivo la gefratoj de Conny Matheus el Nieheim elpensis eksterordinaran donacon. Ili lasis konstrui por li masivan, 200-kilogramman benkon de la konata motorsegilo-artisto Gert Schoppe, por montri per ĝi la diversajn hobiajn de Conny. La flankaj partoj estas du ranoj kaj sur la dorsobreto estas cizelita "Lasi vagi la pensojn en kontempla ripozad" estas riĉeco kaj ĝojo kaj por ideokread." Kaj eĉ ne forgesitaj estas sur la sidbreto du fiksiloj por bieroboteloj! Espereble Conny nun havos sufiĉe da tempo por eluzi la benkon kaj praktiki sur ĝi Esperanton.

K. Matheus, Foto: P. Matheus